

SPEGULO

SPEGULO

SOCIKULTURA, SENDEPENDA REVUO EN ESPERANTO

Aperas 4 fojojn jare. Eldonkvanto: 300 ekz. ISSN 1898–6803.

REDAKTAS: Tomasz Chmielik – ĉefredaktoro (tchmj@wp.pl),

PL 21-040 Świdnik, str. Jarzębinowa 3/30

Andreas Künzli (kuenzli@osteuropa.ch)

Blockweg 8 CH-3007 Bern

Kazimierz Leja (spegulo@hejme.com.pl),

PL 41-250 Czeladź, skrytka 59

Lidia Lięza (konsilo@gmail.com),

PL 30-091 Kraków, str. Bronowicka 51/2

Stanisław Śmigielski – sekretario de la redakcio

(stansmi@neostrada.pl),

PL 47-206 Kędzierzyn-Koźle, str. Krasickiego 12/6.

Kunlaboras: Luiza Carol (IL), Tomasz S. Chmielik, Zbigniew Galor,

Jerzy O., Ryszard Rokicki (PL), Horst Vogt (DE).

Provleganto: Gonçalo Neves (PT)

ELDONAS KAJ ADMINISTRAS: Eldonejo HEJME, www.hejme.com.pl

JARABONO: – por poloj: 45 PLN, – por eksterlandanoj: 18 EUR
(kun prioritata sendado: en Eŭropo 24 EUR, ekster Eŭropo 30 EUR).

PAGU AL: Wydawnictwo HEJME – Kazimierz LEJA,

PL 41-250 Czeladź, str. Wąska 21/3

mBank: PL36 11402004 00003202 31411644

kodo BIC/SWIFT por mBank: BREXPLPWMBK, SORT CODE: 11402004

Plena nomo kaj adreso de la banko:

BRE BANK SA Internet Banking, Al. Mickiewicza 10, PL 90-050 ŁÓDŹ

Eksterlandanoj povas pagi ankaŭ al UEA-konto de Kazimierz Leja **<kazl-s>**
mendante tamen ĉe la Eldonejo HEJME!

(Ret)poŝton sendu al la koncernaj personoj.

Pri abonoj kontaktu nur la eldoniston.

La redakcio rezervas al si rajton mallongigi kaj korekti la tekstojn.

Represoj estas permesataj kondiĉe, ke oni citos la fonton.

Specimenon de represita teksto sendu al la eldonejo.

Sojle al 2009

Pasas la jaro 2008. Ĝi estis por ni malfacila kaj promesplena. Kiam en Krakovo februare ni decidis fondi novan revuon ankoraŭ sen nomo (la ideo, ke ĝi nomiĝu SPEGULO venis de Kazimierz Leja), tian, pri kiu revis nia spirita patro, bedaŭrinde ne plu vivanta – la poznanano Tadeusz Chrobak – ni vere sentis timon kaj multiĝis demandoj: kiel, kion, por kiu, kiucele.

Kaj hodiaŭ, kiam antaŭ ni kuŝas kvar dikaj kajeroj – PRINTEMPO, SOMERO, AŬTUNO, VINTRO – kun entute 256 paĝoj, ni jam scias pli-malpli la respondon al tiuj demandoj, kiuj tiam en Krakovo afliktis niajn pensojn.

KIEL? Simple atentokapte laŭ enhavo, sed ankaŭ modeste kaj plaĉe laŭaspekte.

KION? Ĉiam tion, kio pensigas, kio restos longe en la memoro. Kiel ni diris, ligas nin diversaj spertoj de 1989, kiam falis malnovaj reĝimoj kaj aperis novaj ŝtatoj, do pri tiu diverseco ni volas paroli sen limigoj, sen baroj, sen tabuoj. Ligas nin Meza kaj Orienta Eŭropo kaj tiun ĉi mondoparton ni klopodas malkovri – se eble – plej multe. Ligas nin diversgrade spertoj pri la du totalismoj – Hitlera kaj Stalina – kaj ni pensas, ke nia devo estas rememorigi, por ne forgesi la okazintan, sed ankaŭ turni precipan atenton al tio, kio sekvas. La esperantistan movadon ni vidas kiel integran parton de la tiama kaj nuna historioj kaj volas ĝin prezenti intermiksita kaj entirite en la reton de la totalismaj reĝimoj – plej ofte malgraŭvole kaj spite al la propraj idealoj, sed ankaŭ rekonite kaj agnoskite – kun respekto kaj estimo por la homama celado en la nova realo, kies komencon signas ĝuste 1989.

POR KIU? Por leganto postulema, por leganto aktive partoprenanta en la Esperanta kulturo, por leganto, kiu ne lasas kontentigi sin per ia ajn kaĉo, kiu ŝatas alfronti temojn instigajn pense, sed estas samtempe malfermita al la opinioj de aliaj, por leganto, kiu – samkiel ni – malŝatas ĉion flatan, memlaŭdan, orgojlan kaj fanfaronan.

KIUCELE? Por malkovri novajn lokojn, ekkoni novajn homojn, eĉ se ili malsamas kaj havas aliajn opiniojn. SPEGULO volas per Esperanto forlasi la „verdan geton” kaj serĉi geamikojn inter la reprezentantoj de diversaj lingvoj, religioj kaj kulturoj. En iliaj opinioj ni trovas fojfoje la konfirmon de la Zamenhofaj idealoj kaj vidas, ke la esperantistaj klopodoj kaj strebadoj aktualas, sed ĝuste en konkordo kun la ekstera mondo. Ni ne povas plu esti izolita insulo en la oceano da homaj aferoj. Venis la plej urĝa tempo konstrui pontojn anstataŭ barilojn. La hodiaŭa mondo bezonas nin tiaj, kiaj ni estas – sen mitoj, sen falsaj ideologioj, sen diletanteco, kiel seriozajn partnerojn. Kaj al ĉi tiuj celoj servas ĝuste SPEGULO.

La nunan redakcion konsistigas la kvinopo: Tomasz Chmielik (ĉefredaktoro), Andreas Künzli, Kazimierz Leja, Lidia Ligęza kaj Stanisław Śmigielski.

Ni atendas kontribuadojn de niaj legantoj. Ne hezitu, ne timu. Pliriĉigu la enhavon de SPEGULO kaj kunlaboru kun ni, por ke la revuo ĉiam estu pli alloga kaj pli interesa.

Por ke nia revuo vivu, ni bezonas vian helpon per abonoj. Se vi jam estas abonanto kaj leganto, ni petas diskonigi SPEGULON inter geamikoj, sed vi povas ankaŭ donaci la abonon al esperantisto en malriĉaj landoj.

La redakcio

ENHAVTABELO por la jaro 2008

PRINTEMPO (1)

Paĝo

1. Tomasz Chmielik – Redaktore
5. Éva Tóth – Universala Deklaro de la Lingvaj Rajtoj kaj genocido de lingvoj
9. Trevor Steele – Akuzato Holzman (el la verkata romano)
15. Kvizo
16. Mikaelo Bronštejn – Mi stelojn jungos al revado...
24. Luiza Carol – La mistera vizitantino
25. Tomasz Chmielik – Julian Tuwim (1894–1953)
28. Julian Tuwim (trad. Lidia Ligęza) – La balo en opero
37. Halina Birenbaum (trad. Tomasz Chmielik) – Espero mortas la lasta
46. Tomasz S. Chmielik – Krzysztof Kieślowski: Tri koloroj – Blua
51. Tomasz S. Chmielik – Sembene Ousmane – la patro de la afrika kino
53. Jerzy O. – Dinah Washington (1924–1963) – la bluso–majstrino kun atlasa voĉo
56. Tomasz Chmielik – Recenze pri: Ruben Gallego, Blanko sur nigro
58. Andreas Künzli – Recenze pri: Dagmar Leupold, Grüner Engel, blaues Land
63. Luiza Carol – De informadiko al teatro-filma rondo

SOMERO (2)

65. Kazimierz Leja – Redaktore
67. Andreas Künzli – UEA 100-kara! Kaj kio plu? (subjektiva komento)
72. Mieczysław Jastrun (trad. Lidia Ligęza) – Kateto
73. Andreas Künzli – Milito kaj paco laŭ Hector Hodler
85. Andreas Künzli (komp. Tomasz Chmielik) – Funebre: Claude Piron (1931–2008)
87. Claude Piron – Esperanto, ĉu verko de Dio?
90. Dubravka Ugrešić – Jugoslavio, toys for boys
95. Eqrem Basha (trad. Tomasz Chmielik) – Elektitaj poemoj
100. Grigorij Kanovič (trad. Tomasz Chmielik) – Kaprido por du ĝroŝoj (fragm.)
111. Tomasz S. Chmielik – Kieślowski: Tri koloroj – Blanka
115. Jerzy O. – Bessie Smith (1895–1937) – la imperiestrino de bluso
117. Manuel – Mallonga enkonduko al la verdkaba muziko
119. Zdravko Seleš – Recenze pri: Predrag Matvejević, Meditarenea brevierio
121. Andreas Künzli – Ekrekonvalescenco post la ŝokterapio (pri la varia percepto de la kritiko de Jan Tomasz Gross)
127. Kvizo
128. La statuetoj de SPEGULO aljuĝitaj unuafoje!

AŬTUNO (3)

Paĝo

129. Stanisław Śmigielski – Redaktore (Imprese pri la Kongreso de Esperantistoj–Ĵurnalistoj 2008)
131. Kalle Kniivilä – Konformismo en la Esperanta gazetaro
134. Andreas Künzli – El la historio de la Esperanto–movado: „Kio ne estas malpermesita, tio estas permesita” – Sovetia Esperanto–movado en kvazaŭsekreta misio (intervjuo–konversacio kun Boris Kolker kaj Anatolo Gonĉarov)
158. Andreas Künzli – Forpasis: Aleksandr Solĉjenicin
169. Aleksandr Solĉjenicin (trad. Tomasz Chmielik) – (el) Arkipelago GULag
173. Tony Judt – La problemo de malbono en la postmilita Eŭropo
181. Slavenka Drakulić (trad. Tomasz Chmielik) – Doktoro Poeto kaj Sinjoro Krimulo
183. Tomasz S. Chmielik – Kieślowski: Tri koloroj – Ruĝa
189. Andreas Künzli – Danko pro la aljuĝita premio de la Fondaĵo Antoni Grabowski

VINTRO (4)

193. Lidia Ligęza – Redaktore (Iom resume...)
195. Bronisław Geremek (trad. Tomasz Chmielik) – Eŭropo de multaj patrujoj
204. Romuald Jakub Weksler–Waszkinel – Kie estas mia patrujo?
214. Birthe Lapenna – Ivo Lapenna
216. Andreas Künzli – Ĉu Esperanto povas lerni ion de la sorto de Ido? (intervjuo kun Gonçalo Neves kaj Robert Pontnau)
225. Andreas Künzli – 1968 – ĉu nur duona revolucio? (omaĝe al grava historia cezuro)
234. Jean-Marie Gustave Le Clézio (trad. Gilles H.) – Ourania (fragm.)
245. Witold Gombrowicz, Taglibro (fragm., trad. Tomasz Chmielik)
246. Sohna Aisha Ndiaye (komp. Tomasz Chmielik) – Jom-Kersa-Mun kaj négritude (pri la verko de Léopold Sédar Senghor)
252. Léopold Sédar Senghor (trad. Jean-Pierre Danvy kaj Tomasz Chmielik) – elektitaj poeziaĵoj
256. Korektoj